# Esperanto - La Bitbulteno 93


esperanto.es

## YA ESTÁ EN MARCHA LA WEB DEL CONGRESO ESPAÑOL DE ESPERANTO

El 82º Congreso Español de Esperanto tendrá lugar este año en la localidad valenciana de Cheste, del 5 al 8 de septiembre del 2024. Cheste es una localidad situada a unos 30 kilómetros de la ciudad de Valencia, con una destacada relación del esperanto, que históricamente ha tenido una de las mayores proporciones de hablantes de la lengua internacional en proporción con la población. Incluso dos calles tienen nombres de esperantistas locales. La sede concreta será el enorme Complejo Educativo, más conocido como la antigua *Universidad Laboral*, donde también será posible alojarse.

Se está trabajando ya en el programa del congreso, que, como es habitual en nuestros encuentros, tendrá una componente cultural importante, pero también una parte lúdica y turística, así como la oportunidad de practicar el esperanto con hablantes de diferentes lugares, españoles y de fuera de la península. Que no te intimide el nombre de "Congreso": es un encuentro en el que cualquier hablante de esperanto, incluso principiante, puede participar y disfrutar. Además, sobre todo para visitantes procedentes de lugares lejanos, está previsto un muy amplio programa post-congresual, con visitas a la región valenciana, guiadas por esperantistas locales.

Ya se dispone de la página web del Congreso, que irá completándose poco a poco con más detalles. Puedes verla en esta dirección, y también ya te puedes inscribir en el congreso. Hay un plazo de inscripción con cuota reducida hasta el 30 de abril. Aprovecha y reserva tu plaza.




## RENOVADA LA PÁGINA WEB DE LA FEDERACIÓN

La página web de la Federación, esperanto.es, ha recibido una importante renovación en estas pasadas semanas. Se ha modificado el sistema de publicación y se ha cambiado el aspecto básico y parte de los contenidos.

Si hace tiempo que no la visitas y no te habías dado cuenta, te invitamos a que la eches un vistazo. Todavía hay algunos detalles que perfeccionar, así que si tienes alguna observación, puedes escribirnos a esperanto@esperanto.es.

## CALENDARIO CIENTÍFICO DE NUEVO EN ESPERANTO EN 2024

El Calendario Científico Escolar del año 2024, editado por el Consejo Superior de Investigaciones Científicas de España (CSIC), se presenta de nuevo este año con una versión en esperanto. El calendario consiste en una colección de efemérides y aniversarios relacionados con la ciencia, con especial atención a la diversidad de los protagonistas.

Desgraciadamente este año, por razones presupuestarias, no se ha podido publicar el calendario en pdf, pero en este enlace: https://digital.csic.es/handle/10261/341368 se pueden encontrar los textos en esperanto y también un archivo en formato *iCal*, que puedes incorporar a tu propio calendario personal. Además, recordamos que se dispone también de una cuenta en *X*, que todos los días publica el aniversario correspondiente: https://twitter.com/SciKalendaro.

De la traducción se ha encargado un equipo coordinado por la Federación Española de Esperanto. Más información sobre la presentación oficial por parte del CSIC puede leerse aquí y aquí.




## IV ZOCO DE LAS LENGUAS Y CULTURA EN SEVILLA

En el marco del proyecto de Cooperación al Desarrollo RASDELE de fortalecimiento de la enseñanza de español en los campamentos de refugiados saharauis, el 15 de marzo se celebró en la Universidad de Sevilla el IV Zoco de las lenguas y culturas por la mañana en la Facultad de Filología y por la tarde en la Facultad de Educación.

Entre las lenguas disponibles estuvo el esperanto. Vicente Manzano y su hija Gabriela crearon un juego “ANTO, el juego del Esperanto”, con 20 carteles, mostrando las características principales del idioma, con vistas a su utilización por parte de los jóvenes visitantes.

En este enlace se puede acceder a una entrevista con ambos.

## REPORTAJE SOBRE LA ENSEÑANZA EN INSTITUTO DE VÉLEZ-MÁLAGA

Diversos diarios del grupo "Prensa Ibérica", han publicado en marzo un artículo sobre la enseñanza del esperanto en el Instituto de Enseñanza Media Almenara de Vélez-Málaga, entre los cuales "El Periódico de España", "La Nueva España", "Levante", "La Opinión de Murcia", "Diario de Mallorca", y otros, con el título: «La proeza del único instituto de España que ha resucitado el esperanto, el idioma que creó un oftalmólogo polaco en 1887: "El fin no es competir con el inglés"», con una entrevista con el profesor motor de la iniciativa, Fabián Jiménez.




## MÁS POESÍA POR PALESTINA, TAMBIÉN EN ESPERANTO

En el anterior número informamos de una presentación poética de Jorge Camacho, también en esperanto, en favor del pueblo palestino. Otras actividades similares tuvieron lugar en enero, organizados por colectivos de poetas madrileños, con la participación de los escritores en esperanto Miguel Fernández y de nuevo Jorge Camacho.

El más importante fue el maratón poético Poesía por Palestina, que tuvo lugar en más de treinta ciudades el 20 de enero. En la convocatoria de Madrid, que tuvo lugar en el CSOA (Centro Social Okupado y Autogestionado) *La Ferroviaria*. participaron más de 120 poetas, entre los cuales los citados Miguel y Jorge. Miguel Fernández declamó su poema "Gaza en el corazón", en su traducción al castellano (que puede escucharse en este enlace) y en parte en la versión original en esperanto (que puede escucharse aquí)

## EUROVISIÓN EN ESPERANTO

Los aficionados al Festival de la Canción de Eurovisión conocen la polémica sobre la canción que representará a España en el 2024, con el título "Zorra". Para quien quiera saber más, o para impresionar a los amigos, ahora tenemos también la versión en esperanto. Puedes encontrarla aquí: https://youtu.be/TaaGH0i8E64.

Por otro lado, el esperanto ha tenido una participación activa este año en ese festival: una de las canciones que participó en la selección previa en la República de San Marino estaba cantada en nuestra lengua. Se trata de "Mi sangas sen vi" (Sangro sin ti), cantada por Sandro Machado. Aunque la canción no fue seleccionada finalmente, se trata de un hito, ya que es la primera vez que el esperanto ha participado en el marco del concurso de Eurovisión. Puedes escucharla aquí: https://www.youtube.com/watch?v=Cc2AIWTPJII.




## 2024, AÑO DE CONGRESOS DE ESPERANTO EN TODO EL MUNDO

En este año 2024 los que deseen participar en un congreso internacional de esperanto lo podrán hacer en casi cualquier lugar del mundo.

2024 será el año del primer Congreso Universal de Esperanto en África, un suelo largamente esperado. El lugar será Arusha, en Tanzania, muy cerca del Kilimanjaro, el monte más alto del continente. Será una oportunidad única para conocer una parte del mundo no visitada habitualmente desde nuestro país. Las

fechas son del 3 al 10 de agosto, y puedes encontrar más informaciones en la web: https://uk.esperanto.net/2024/.

El 80 Congreso Internacional de Jóvenes Esperantistas tendrá lugar en Europa, concretamente en Šventoji (Lituania), entre el 18 y el 25 de agosto.

El Congreso de la Liga de Profesores Esperantistas tendrá lugar en América, en concreto en Maceió (Brasil), entre el 20 y el 27 de julio.

En mayo, entre el 8 y el 12, tendrá lugar un gran encuentro, el Congreso Europeo, en Estrasburgo, que a la vez será el congreso de las asociaciones francesa y alemana, junto con la asociación de ferroviarios y otras asociaciones nacionales europeas.

Incluso en la Península Ibérica está programado un congreso internacional: el congreso de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT, la Asociación Anacional Mundial), que tendrá lugar en Oporto del 5 al 11 de agosto en el cincuentenario de la Revolución de los Claveles.

Y, por supuesto, recordamos el ya mencionado Congreso español,en Cheste, que sin duda atraerá a numerosos esperantistas de otros países.

Para saber más informaciones sobre estos y otros encuentros de esperanto, visita de vez en cuando la web https://eventaservo.org/.



## ASAMBLEA DE LA FEDERACIÓN ESPAÑOLA DE ESPERANTO

La asamblea general de la Federación Española de Esperanto tendrá lugar durante el Congreso de Cheste en septiembre, pero antes de ella se ha convocado una asamblea extraordinaria para el 19 de mayo a las 11, para aprobar los documentos legales. Los miembros de la asociación recibirán la convocatoria por medio del Boletín.

Recuerda que si aún no eres socio de la Federación, puedes hacerlo mediante el formulario que encontrarás en: http://www.esperanto.es/inscripcion

Este año, en la asamblea de septiembre, corresponde renovar la directiva de la asociación. Cualquier miembro puede participar, y te invitamos a que des un paso adelante.

## JAM PRETAS LA RETEJO DE LA HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO

La 82-a Hispana Esperanto-Kongreso okazos ĉi-jare en la valencia urbo Cheste, de la 5-a ĝis la 8-a de septembro 2024. Cheste situas je ĉirkaŭ 30 kilometroj de la urbo Valencio, kaj havas gravan rilaton kun Esperanto, ĉar historie ĝi havis unu el la plej altaj proporcioj de parolantoj de la internacia lingvo rilate al la loĝantaro. Eĉ du stratoj havas nomojn de esperantistaj aktivuloj. La specifa sidejo estos la impresa Eduka Komplekso, pli konata kiel la malnova “Labora Universitato”, kie ankaŭ eblos loĝi.

Ni jam laboras super la kongresa programo, kiu, kiel kutimas en niaj renkontiĝoj, havos gravan kulturan komponanton, sed ankaŭ distran kaj turisman parton, kaj ankaŭ la eblecon praktiki Esperanton kun prelegantoj el diversaj lokoj, el Hispanio kaj aliaj landoj. Komencantoj ne devas timi pro la nomo "Kongreso": ĝi estas renkontiĝo, en kiu povas partopreni kaj ĝui ĉiu Esperanto-parolanto, sendepende de onia lingvonivelo.

Krome, precipe por vizitantoj venantaj el malproksimaj lokoj, estas planata tre ampleksa postkongresa programo, kun vizitoj al diversaj lokoj de la valencia regiono, gvidataj de lokaj esperantistoj.

Jam disponeblas la retejo de la Kongreso, kiu iom post iom kompletiĝos kun pliaj detaloj. La aliĝilo jam estas inkluzivita en ĝi. Estas aliĝperiodo kun reduktita kotizo ĝis la 30-a de aprilo, kiu estas speciale malalta por eksterlandanoj. Profitu kaj rezervu vian lokon.




## RENOVIGITA LA RETPAĜO ESPERANTO.ES

La retejo de Hispana Esperanto-Federacio, esperanto.es, ricevis gravan renovigon dum pasintaj semajnoj. Oni modifis la sistemon de publikigo kaj la bazan aspekton, krom parton de la enhavo.

Se vi ne vizitis ĝin lastatempe, kaj vi ne rimarkis, ni invitas vin ĵeti rigardon. Restas ankoraŭ kelkaj detaloj por perfektigi, do, se vi trovas ion ŝanĝindan, vi povas skribi al esperanto@esperanto.es.



## LA SCIENCA KALENDARO 2024 EN LA RETO

Jam troviĝas en la reto la Scienca Kalendaro 2024 de la hispana Supera Konsilio por Scienca Esplorado (CSIC), kies datrevenoj estas ankoraŭfoje tradukitaj al Esperanto. Bedaŭrinde ĉijare ne eblis eldoni pdf-version en la internacia lingvo, sed ĉiukaze en la adreso https://digital.csic.es/handle/10261/341368 oni trovas la tekstojn de ĉiu tago, kaj ankaŭ kalendaron en la formato *iCal*, kiun vi povas aldoni al via persona kalendaro. Memoru ke la kalendaro havas ankaŭ tŭiteran konton, kiu ĉiutage informas pri la koncerna datreveno, en la adreso: https://twitter.com/scikalendaro.

Pri la tradukado zorgis skipo kunordigita de Hispana Esperanto-Federacio. Pli da informoj pri la prezentado fare de la CSIC troveblas jen kaj jen.




## *BAZARO* PRI LINGVOJ KAJ KULTUROJ EN LA UNIVERSITATO DE SEVILO

En la kadro de projekto de Kunlaborado por Disvolviĝo, por plifortigi la instruadon de la hispana en la kampadejoj por okcidentsaharaj rifuĝintoj, la 15-an de marto okazis ĉe la Universitato de Sevilo la 4-a Bazaro de Lingvoj kaj Kulturoj, en grandaj tendoj matene ĉe la Fakultato de Filologio kaj posttagmeze en la Fakultato pri Edukado.

Inter la disponeblaj lingvoj estis Esperanto. Vicente Manzano kaj lia filino Gabriela kreis ludon “ANTO, la ludo de Esperanto”, kun 20 afiŝoj, montrante la ĉefajn trajtojn de la lingvo, cele al ĝia uzo de junaj vizitantoj.

En ĉi tiu ligo vi povas aliri intervjuon kun ambaŭ.




## RAPORTO PRI LA INSTRUADO DE ESPERANTO EN MEZLERNEJO

Pluraj ĵurnaloj de la grupo "Prensa Ibérica", publikigis en marto artikolon pri la instruado de Esperanto en mezlernejo Almenara de Vélez-Málaga (Andaluzio). Inter ili: "El Periódico de España", "La Nueva España", "Levante", "La Opinión de Murcia", "Diario de Mallorca", kaj aliaj, kun titolo: «La heroaĵo de la sola instituto en Hispanio, kiu revivigis Esperanton, la lingvon kreitan de pola okulkuracisto en 1887: "La celo ne estas konkuri kun la angla"», kun intervjuo al la instruisto, motoro de la iniciato, Fabián Jiménez.

## PLIA POEZIO POR PALESTINO, ANKAŬ EN ESPERANTO

En la pasinta numero ni informis pri prezentado de Jorge Camacho, favore al la palestina popolo per poezio, ankaŭ en Esperanto. En januaro okazis pliaj aktivaĵoj, eĉ du en sinsekvaj semajnfinoj, organizitaj de madridaj kolektivoj en kiuj rolis niaj Esperanto-poetoj Miguel Fernández kaj Jorge Camacho.

La plej grava estis la poezia maratono Poezio por Palestino, kiu disvolviĝis en pli ol 30 urboj la 20an de januaro. En la kunvoko de Madrido partoprenis pli ol 120 poetoj, inter kiuj la citítaj Miguel kaj Jorge. Konkrete, Miguel Fernández (en la suba foto) deklamis sian poemon "Gazao en la koro" en la hispanlingva traduko (aŭskultebla tie ĉi) kaj parte en la esperanta originalo.



## EŬROVIZIO EN ESPERANTO

La esperantistaj ŝatantoj de la konkurso Eŭrovizio ĉijare havas du bonajn novaĵojn. Unue, la kanto kiu reprezentos Hispanion en 2024 havas version en Esperanto. Vi povas aŭskulti ĝin en:https://youtu.be/TaaGH0i8E64. Atentu ke la kanto, kun titolo "Zorra", estis sufiĉe polemika en Hispanio, do ĝi povas ŝoki

iujn aŭskultantojn.

Aliflanke, Esperanto havis aktivan rolon en la festivalo pere de la procezo de selektado de la reprezentanto en la Respubliko San-Marino, nome, unu el la kantoj partoprenintaj en tiu selektado havis tekston en Esperanto. Temas pri "Mi sangas sen vi" (tiel en la originalo), kantita de la rumandevena Sandro Machado. La Esperantlingva kanto bedaŭrinde ne trafis la finalon, sed eĉ sen tio ĝi havas historian signifon, ja okazis la unuan fojon, ke Esperanta kanto aperis en la kadro de la Eurovizia konkurso. Vi povas ĝin aŭskulti tie ĉi: https://www.youtube.com/watch?v=Cc2AIWTPJII.




**2024, JARO DE TUTMONDAJ KONGRESOJ**

En tiu ĉi jaro la vizitantoj de renkontiĝoj internaciaj havos ĉiujn eblojn ĉeesti kongresojn en ajna parto de la mondo.

2024 estos la jaro de la unua Universala Kongreso en Afriko. Ĝi okazos en Aruŝo (Tanzanio), proksime al la Kilimanĵaro, plej alta pinto de la kontinento. Ĝi estos unika ŝanco koni areon ne ofte vizitatan el nia lando. La datoj estos de la 3a ĝis la 10a  de aŭgusto, kaj eblas trovi pliajn informojn en https://uk.esperanto.net/2024/.

La 80-a Internacia Junulara Kongreso de TEJO okazos en Eŭropo, konkrete en Šventoji (Litovio), inter la 18-a kaj la 25-a de Aŭgusto 2024. Ĝin organizas la Litova Esperanta Junulara Organizo (LEJO).

La kongreso de ILEI (instruistoj) okazos en Ameriko, konkrete en Maceió (Brazilo), inter la 20a  kaj la 27a de julio.

En majo (inter la 8a kaj 12a) okazos antaŭvideble granda renkonto: la Eŭropa Kongreso, en Strasburgo, kiu estos samtempe kongreso de la germanaj kaj francaj asocioj, kune kun la asocio de fervojistoj IFEF kaj la landaj asocioj de Italio, Belgio kaj Svislando.

Eĉ en la iberia duoninsulo estas organizata internacia kongreso: tiu de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) okazos en Porto, inter la 5a kaj11a de aŭgusto, en la jaro de la 60a datreveno de la Revolucio de la Diantoj.

Kaj ne forgesu pri la jam menciita hispana kongreso, kiu disvolviĝos en Cheste, en la valencia regiono, en septembro, kiu certe ĝuos la ĉeeston de multnombraj esperantistoj de aliaj landoj de la mondo.

Pri tiuj kaj multaj aliaj renkontoj kaj kunvenoj, vi trovos la detalojn en la retejo https://eventaservo.org/.



## ĜENERALA KUNVENO DE HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

La Ĝenerala Kunveno de Hispana Esperanto-Federacio okazos dum la Hispana Kongreso en Cheste, en septembro, sed okazos Eksterordinara Ĝenerala Kunveno virtuale la dimanĉon 19an de majo je la 11a horo, por aprobi la necesajn leĝajn dokumentojn. Oni publikigos la alvokon en la revuo Boletín.

Memoru ke se vi ne estas ano de HEF, vi povas fariĝi pere de la formularo kiun vi trovos en: http://www.esperanto.es/inscripcion

Ni atentigas ke en septembro devas okazi la renovigo de la estraro de HEF. Ĉiu ano povas partopreni, kaj ni invitas vin pripensi vian eblan kunlaboron kaj fari paŝon antaŭen.